# Eŭropa Bulteno

Somero 2008, № 7-8 (72-73)

## *De la redakcio…*

Saluton karaj gelegantoj!
Jen fino de ferioj kaj bona momento por novaj komencoj. Nia agado kiu estas ligita al instruado de Esperanto en lernejoj komenciĝas denove, kun novaj ideoj, novaj fortoj kaj novaj lernantoj. Dum la somero okazis multaj interesaj aranĝoj, kaj mi kredas ke vi plenkore ĝuis unikan internacian kaj amikan etoson en tiuj aranĝoj kiujn vi partoprenis.

Por ĉi tiu somero mi elektis IJK en Szombathely en Hungario. Ĝin partoprenis ankaŭ Zlatko Tišljar (parte) kaj Peter Balaž (plene). Ili du prezentis ideojn kaj laboron de EEU tra kelkaj prelegoj bone vizititaj de partoprenantoj. Partoprenantoj venis el 35 landoj kaj aĝis inter 2 kaj 74 jaroj.
Multaj interesaj prelegoj kaj diskutoj okazis (tamen ege malfrue vespere), multaj novaj konatiĝoj, iom




nekutima kultura programo kaj lingva festivalo, promenoj kaj amikumadoj en buntaj kafejoj en bela, trankvila panonia urbeto. Tiel ni travivis unu semajnon de niaj ferioj.
Fine de la aranĝo okazis ankaŭ akvobatalo inter partoprenantoj kaj lokaj fajrobrigadistoj, kies rezulto montris ke eble povus esti elektita iu pli taŭga posttagmeza amuzo.
Per ege interesa kaj bone pripensita internacia vespero en loka teatro finiĝis la IJK 2008, la flago estis transdonita al la LKK de IJK 2009, kiu okazos en ĉeha urbeto Liberec.
Kaj kie vi estis? Kiel vi fartis? Kiom da novaj adresoj en viaj adreslibretoj? Kiom da neforgeseblaj ridetoj kaj novaj amikoj? Skribu al ni pri viaj ferioj.

Agrablan legadon,
Vesna Obradović

# EEU-KONFERENCO EN GROSETTO



Kadre de la 75-a Itala E-kongreso okazinta en Grosetto (suda Toskanujo) okazis ankaŭ Eŭropa konferenco "Estonteco de la ideo pri eŭropa identeco" organizita de EEU la 25-an kaj la 26-an de aŭgusto 2008. En la konferenco prelegis Sean O Riain, Renato Corsetti, Ranieri Clerici kaj Zlatko Tišljar, kiu prezentis du prelegtemojn »Verŝajna lingva stato post 50 jaroj« kaj »Eŭropaj valoroj«. Partoprenis en unuopaj prelegoj (entute 5) inter 20 kaj 80 partoprenantoj kaj post chiu prelego estis vigla debato. Pri la konferenco ni aperigos malgrandan broŝuron kun la kvin prelegoj. Estis bona sperto ke EEU aranĝas siajn programerojn ene de aranĝoj de siaj landaj asocioj.



La 75-a Itala E-kongreso okazis en Grosetto inter la 22-a kaj 28-a de aŭgusto. Italoj ĝuas en siaj kongresoj kaj aranĝas ilin kun multaj ludoj, festoj kaj abunda kulturo. Estas tradicio ke kadre de la kongreso oni organizas futbalan matĉon inter la E-junularo kaj la loka futbala teamo. Ĉi-foje la lokuloj venkis per 8:0, kio estis pli bona ol en la pasintjara kongreso. La malfermo okazis en salono de la monahejo de Sankta Francisko kaj krom la italaj festparolantoj parolis ankaŭ Sean O Riain pri strategio de EEU, en kiu gravan rolon ludas lernfaciliga faktoro de Esperanto.



Ĉar kelkaj plendis ke la interkona vespero ne estis bona interkona vespero, la prezidanto Corsetti proklamis la postmalferman matenan tempon: la interkona mateno. Oni alportis iom da manĝoj kaj trinkaĵoj kaj korte de la monaĥejo eblis interkonatiĝi. Kulture la kongreso estis tre riĉa. Ĉiutage bonaj koncertoj de korusoj lokaj kaj alilandaj, de individuaj kantistoj. Kompreneble ke oni povis mallonge ekskursi kaj longe (postkongrese). Sed ankaŭ laboraj programoj abundis. Okazis aro da kursoj kaj ekzamenoj, prelegoj, la EEŬ-konferenco, prezentoj de novaj libroj.

La plej mirinda afero estis efektive la grandioza interesiĝo pri la kongreso far medioj. Ĉiutage almenaŭ unu el la programoj estis filmita de iu el lokaj televidoj, okazis pluraj radio- kaj televidaj intervjuoj kaj oni aperigis plurajn artikolojn en la gazetaro. Ankaŭ la prezidanto de EEU estis kelkfoje intervjuita. Mi kredas ke malmultaj nacilingvaj E-kongresoj havas tioman atenton far la neesperantistaj publikaj medioj. Interese, ke malgraŭ tio ke temis pri nacia kongreso, partoprenis esperantistoj el deko da landoj: entute ĉirkaŭ 150 partoprenantoj.

**Zlatko Tišljar**

# 67-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Inter la 3-a kaj la 6-a de julio 2008, okazis en Hispanio, sub la komuna titolo "Lingvoj, trezoro por la homaro" la jara nacia kongreso de Esperanto.
Ĉi tiun jaron la elektita loko por celebri ĝin estis la trankvila kaj belega urbo Kvenko, kiu situas centre de la duoninsulo kaj meze de montaro akirante tiel mirindajn pejzaĝojn kaj garantíante iom pli malvarman kaj mildan veteron ol la pasintjara kiu okazis en la sudandaluzia urbo Paloso.
La eventon partoprenis cento da esperantistoj, kiuj kreis agrablan esperantan etoson kaj ĝuis multajn momentojn por interparoli esperante, praktiki daŭre nian lingvon kaj denove renkontiĝi kun malnovaj geamikoj.
Post la oficiala malfermo de la kongreso, entenante salutojn kaj akcepton far la urbestro de Kvenko kaj aliaj elstaraj urbananoj, salutmesaĝon de Probal Dasgupta, kaj salutojn de kelkaj fremdlandaj partoprenantaj, oni prelegis pri diversaj malsimilaj temoj kiel Gramatikaj aspektoj de esperanto, La monda problemo de la akvo, Ateliero pri poezio , La ĉina drako: lingvo, kulturo, movado, Prezentado de diversaj esperantaj libroj, Esperanta tradukado de poezio, ktp… kaj ĉiu prelego akiris elstaran nivelon.



Kiel ĉefajn prelegantojn ni povas citi gravajn esperantistojn de la hispana movado kiel Miguel Gutierrez Aduriz (akademiano), Jorge Camacho (premiita poeto), Miguel Fernandez (ankaŭ premiita poeto), Abel Montagut (fama vekisto), kaj aliaj malpli konataj samideanoj sed ne tial malpli elstaraj prelegantoj: Jose Antonio del Barrio, Antonio Valén, Ana Manero, Lorenzo Noguero, Augusto Casquero, Mª Rafaela Urueña…
Samtempe kun la ĉefaj prelegoj, oni okazigis aliajn programerojn kiel kurso de Esperanto, ekspozicio kaj vendado de esperantaj libroj, ekspozicio kaj gustumado de nekuiritaj manĝaĵoj (ĉefe vegetaloj kaj fruktoj), ktp…
Ĉiuvespere oni havigis sufiĉan tempon por interparoli (esperante kompreneble), konatiĝi kaj amikiĝi, la ĉefa afero en ĉiu esperanta renkontiĝo.
La lastan tagon, antaŭ la kuna manĝado de adiaŭo oni vizitis turisme la urbon, kaj oni povis ĝui interesan kulturan kaj turisman programeron ĝuante nekredeblajn naturajn bildojn.
Dimanĉon, post tagmaĝo ni ĉiuj adiaŭis unu la alian, iom malgajaj sed aliflanke ankaŭ feliĉaj kaj atendante aliajn baldaŭajn esperantajn eventojn.

**Jose Roldan Leon**

# ESPERANTO-INSTRUISTOJ MULTOBLE PLI INTERESITAJ PRI LERNEJAJ EŬROPAJ AFEROJ OL NACILINGVAJ INSTRUISTOJ



Eŭropa Unio organizis en 2007 vastan tuteŭropan esploron pri modernigo de edukaj sistemoj en Eŭropa Unio kaj petis eŭropskale edukajn kaj neregistarajn organizojn kaj instruistojn respondi al enketo pri tio. En junio 2008 ili aperigis la rezultojn de la esploro ĉe: http://ec.europa.eu/education/school21/results_en.html Montriĝis ke entute respondis al la enketo nur 83 institucioj kaj nur 160 individuaj instruistoj. El Luksemburgio ekz. respondis neniu dum el pluraj landoj oni trovas nur unu respondon inter kiuj estas grandegaj landoj kia Hispanio kaj Rumanio. Tamen inter la respondintoj trovighas eĉ 6 individuaj esperantistoj (Leo de Coman, Daan Van Herpe kaj Jean-Marie Jacques el Belgio, Laszlo Gados el Hungario, David Curtis el Britio, Luis de Ladeira el Portugalio, kaj unu organizo (Asocio por eŭropa Konscio el Maribor – Zlatko Tišljar) kiuj ene de siaj respondoj klare proponis iun rolon de Esperanto en la estonta lernsistemo de Eŭropo. Konsiderante la vere nekompreneble malgrandan reagon far naciaj organizoj kaj instruistoj nia reprezentiĝo en tiu enketo montras enorman interesiĝon de esperantistoj por la estonta lerneja kaj eduka sistemo.
Rezultoj ĝeneralaj de la enketo troviĝas ĉe http://ec.europa.eu/education/news/news492_en.htm

**Zlatko Tišljar**

# EŬROPA SOCIA FORUMO

La Europa Socia Forumo okazos de la 17a ĝis la 21a de septembro tagmeze en la sveda urbo Malmo. Oni atendas 20.000 personojn el la tuta Eŭropo kun centoj da prelegoj kaj 400 kulturaj aktivecoj, koncertoj, filmoj, teatraĵoj kaj foiro. La Forumo komenciĝas je la 18a horo la 17an de septembro.
Sean O'Riain, la prezidanto de Europa Esperanto Unio prelegos pri Esperanto: "Egalrajta tutmonda interkultura dialogo" sabaton, la 20an de septembro je la 9.30 horo en Folkets Hus, salono 7, kiu situas en Olof Palmes placo numero 1. La seminario dauros entute 1.5 horoj kaj post la prelego sekvos kurseto pri Esperanto fare de la konata sveda instruisto Lars Forsman.
DEA kaj SEF havos ankau budon dum la Forumo, kaj esperantistoj kiuj intencas partopreni la Forumon estas bonvenaj ĉe nia budo.
Pliaj informoj che: www.esf2008. org

La 21an de septembro de la 11a ĝis la 19a horo okazos lingva festivalo en Kopenhago, en la Kulturdomo de Dortheavej 61, kun lingvaj prelegoj, budoj, muzikaranĝoj kaj koncerto. Ankaŭ ĉe la lingvo-festivalo Sean O'Riain partoprenos kaj prelegos pri sia gepatra lingvo. Vidu: www.sprogfestival. dk

**Ileana Schroeder**

# INTERVJUO KUN SINJORINO LJUDMILA NOVAK, deputitino de Eŭropa Parlamento



- ***Kiam vi renkontiĝis kun Esperanto kaj kiel fluis via »esperantista kariero«?***
  Kiam mi frekventis elementan lernejon, mi deziris iam scii laŭeble multajn lingvojn. Ĉar mia naskiĝvilaĝo estas proksime de aŭstria landlimo, ni lernis la germanan lingvon. Tiam el Maribor venis al la lernejo juna instruistino Marta Berdnik, kiu parolis Esperanton. Ŝin instruis Priska Haas, la patrino de dua edzino de Tito. La instruistino organizis kurson kaj en la unua horo partoprenis preskaŭ la tuta klaso. Ĝis la kursofino lernis nur du lernantinoj kiuj post la fino de la elementa lernejo daŭrigis lerni kaj partoprenis en esperantaj aranĝoj. Mi partoprenis en du junularaj Esperanto-kongresoj, en Tesaloniko (Grekio) 1976 kaj en Poitiers (Francio) en 1979, krome en esperanto-tendumado en Lanĉov (Ĉeĥio), en iu kunveno en Budapeŝto kaj en kelkaj renkontiĝoj en Slovenio. Pri ĉiuj tiuj renkontiĝoj kaj aranĝoj mi havas nur la plej belajn memorojn, kvankam de tiam pasis tridek jaroj. Tio estis ankaŭ miaj unuaj internaciaj kontaktoj kaj gravaj spertoj por mia vivo.

- ***Kion vi opinias, kial politikistoj grandparte kontraŭas la ideon pri Esperanto kiel ebla kandidato por solvi la lingvan demandon en EU?***
  La angla grave superregas aliajn lingvojn kaj tial la plimulto de la politikistoj ne kredas ke Esperanto ankoraŭ povus transpreni gvidan rolon rilate la komunikadon inter la diversaj popoloj. La plej multaj el ili ankaŭ ne sufiĉe konas Esperanton kaj ties avantaĝojn.

- ***Kion oni devus fari ke esperantistoj akiru la pozicion en kiu oni traktus ilin en eŭropa socio kiel seriozajn partnerojn, kiuj ne parolas pri utopio sed pri io kio vivas kaj atendas por esti rimarkita?***
  Estas necesaj agoj. Eble komencaj kursoj en kiuj oni prezentus al kiel eble plej multaj homoj avantaĝojn de Esperanto, ties uzeblecon kaj elementojn de ties gramatiko. Ili baldaŭ komprenus ke Esperanton eblas multe pli rapide lerni ol aliajn lingvojn. Estas grave ankaŭ havi verajn renkontojn kaj interparolojn kun apartenantoj al diversaj popoloj en kiuj oni konstatas ke Esperanto estas tre utila, ĉar per ĝi eblas samtempe paroli kun multaj homoj de diversaj popoloj.

- ***En la lastaj du jaroj vi multe helpis la Esperantistan movadon kaj tial EEU prave decidis atribui al vi la statuson de honora membro por la jaro 2008 kune kun Margareta Handzlik. Ĉu vi daŭrigos plu subteni Esperanto-movadon?***
  Ĉiam mi kun ĝojo helpas al tiuj, kiuj petas min pri helpo, se – kompreneble – tio estas realigebla. Kiom eblos, mi helpos ankaŭ estonte. Ĉar mi havas ankaŭ multajn aliajn devojn kaj respondecojn, mi ne povas tre intense kunlabori en via organizo. Mi dankas por la honora membreco kaj deziras ke la voĉo de esperantistoj estu aŭdata en EU kaj ke Esperanto estu almenaŭ menciita kiel unu el la ebloj en la estonta strategio de la lingva politiko en Eŭropo.

- ***Ekzistas partio E-D-E (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) en Francio (nun ĝi fondas siajn filiojn en pluraj aliaj ŝtatoj kiel Germanio, Hungario, Ĉeĥio…) kiu intencas prezentiĝi dum la balotoj por eŭropa parlamento en 2009. Ĉu vi opinias ke estus bone, se ni fondus branĉon de tiu partio ankaŭ en Slovenio?***
  Se vi opinias ke vi havas sufiĉe da homoj, kiuj tion efektivigus, indas provi.

- ***Ĉu vi estus preta en la estonto eniri iun eŭropan aŭ mondan organon de esperantistoj (ekz la estraron de EEU)?***
  Momente mi ne pensas pri tio, ĉar mi ne parolas plu aktive Esperanton. Mi ĝojas ke mi povas multe kompreni kaj tiu scio bonvenas al mi kiam mi lernas aliajn fremdlingvojn. En Eŭropa Parlamento nome estas tre grava scio de lingvoj. Ĉar mi havas familion kaj ankaŭ plurajn politikajn funkciojn kaj mi ankaŭ okupiĝas pri kulturo, mi ne povas transpreni novajn taskojn. Nun mi ĝojas por esti honora membro.

  **Intervjuis: Zlatko Tišljar**

## ONTAJ ARANĜOJ DE EEU 2008-2009

- Inter la 10-a kaj 13-a de septembro 2008 okazos Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) kadre de kiu EEU kiel partnero organizas unu sesion pri la temo: "Kiel ni plibonigu lingvolernadon, kaj plifortigu Europan identecon" Partoprenos 5 prelegantoj.
- La 8-a kongreso de EEU okazos en Herzberg (Esperanto-urbo) en meza Germanio dum la pentekosto 2009 (28.05-01.06.2009) La ĉeftemo: Kreiveco kaj novideoj en neekzaktaj sciencoj



**Maribor**

- En 2010 okaze de centjariĝo de Esperanto-societo Maribor okazos en Maribor Eŭropa Konferenco pri la temo "Eŭropunia politiko pri laborlingvoj"

**Vesna Obardnović**

# EŬROPA LINGVA TAGO



La 26-an de septembro, dum la eŭropa lingva tago estos malfermata ekspozicio pri Esperanto (ok afiŝoj dezajnitaj de Danka Tišljar kaj malgranda ekspozicio de libroj) en la antaŭspacoj de la reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana, ĉefurbo de Slovenio. Dum la malfermo parolos Ljudmila Novak, eŭropa parlamentanino kaj kelkaj aliaj oficialuloj.

# STUDENTA INTERNACIA KONFERENCO EN MARIBOR PRI INTERKULTURA DIALOGO

Organizita de Studenta organizo de Maribora Universitato la 10-a studenta internacia konferenco SCIM okazinta inter la 25-a kaj 30-a de junio gastigis ankaŭ Zlatko Tišljar, sekretarion de EEU, kiel preleganton. Li prelegis la 25-an de junio al trideko da gestudentoj el Slovenio, Slovakio, Pollando, Ukrajnio, Rusio, Rumanio pri la temo „Sub kiuj kondiĉoj la interkultura dialogo estas ebla". Li disdonis ankaŭ informojn pri Esperanto.

**Zlatko Tišljar**

# EN EŬROPA PARLAMENTO PRI ESPERANTO



**Bronisław Geremek**

La 14-an de julio 2008 okazis en Eŭropa parlamento en Bruselo diskuto je la temo: Esperanto: ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo. La inviton al la forumo sendis nome de dekkvino da EP-anoj unu el la vicprezidantoj, sinjoro Bronisław Geremek kaj kunsubskribnis EP-anino Ljudmila Novak. Partoprenis 25 personoj inter kiuj 6 parlamentanoj de EP.



Pro la bedaŭrinda morto de sinjoro Geremek tagon antaŭe en aŭtoakcidento enkonduke parolis Sean O Riain kaj Ljudmila Novak. Partorenis en la debato ankaŭ Margareta Handzlik kaj germana parlamentano.
En la sama ejo estis prezentita antaŭ abunda ekspozicio de Esperanta materialo.

**Maja Tišljar**

# JARASEMBLBLEO EN ROTERDAMO



Regula jara Asembleo de EEU por la jaro 2007 okazis en Roterdamo kadre de UK la 22-an de julio 2008. En la oficiala fermita parto nur por la asembleanoj ĉeestis asembleanoj el 12 landoj membroj plus kvin observantoj. Ĉar momente estas en EEU aliĝintaj 23 landoj, la asembleo povis plenrajte decidadi. Post kutima prezento de la raportoj pri 2007-a jaro kaj por la unua duono de 2008 la asemblanoj unuanime akceptis la raportojn kaj diskutis pri la planoj. Interalie oni proponis kaj estis akceptite alelekti unu revizianton por financa jara finraporto. Oni elektis en tiu funkcio sinjorinon Helen Fantom el Britujo. Ĉar estis elekta jaro la Asembleo reeltis por plia trijara mandatperiodo la saman estraron, t.e. dro Sean O Riain kiel prezidanto, Flory Witdoeckt kiel vicprezidantino kaj kasistino,



Zlatko Tišljar kiel sekretario, Peter Balaž kaj Georgo Handzlik kiel membroj. La Asembleo notis la informojn ke ĉi-jare EEU ricevis subvencion por sia funkciado kaj tiusence luis ejojn en Bruselo kie laboros oficistino (oficdirektoro) ĝis la jarfino Maja Tišljar. Oficiala labordonanto por ŝi estos ekde septembro GEA kiel kunorganizanto de la sekva kongreso de EEU.

La estraro havis 3 kunsidojn kaj kelkajn interparolojn interalie kun sinjorino Angela Tellier rilate la kunlaboron pri propedeŭtika agado de ŝia lernejo, kun GEA reprezentantoj kaj reprezentantoj de ICH el Herzberg pri la sekvajara kongreso. La oficiala transdono de la diplomoj al la ĉi-jaraj honoraj membrinoj Ljudmila Novak kaj Margareta Handzlik ne okazis, ĉar ili ne ĉeestis.




La estraranoj de EEU estis krome tre ajktivaj kadre de UK. La prezidanto prelegis kadre de la Lerneja Tago kaj kunsidis kun Barbara Pietrzak pri rilatoj inter EEU kaj UEA. Z. Tišljar prelegis kadre de la lernaja Tago kaj Esperantologia Konferenco. Petro Balaž prelegis kadre de Eduka Tago pri E@I.

Dum la malferma kunveno de EEU ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj. Post prezento de la agado kaj rezultoj de EEU, aldonan prelegeton faris Michael Cwick kaj okazis vasta diskutado. Ni prezentis ankaŭ laborversion de la 12-minuta filmo »Eŭropo 2050«, kiun reĝisoris Andrej Naterer.

La estraranoj havis plurajn neoficialajn interparolojn kun Etsuo Mioshy, kun Jozefo Reinvart, kun Humprey Tonkin (ESF) kaj asembleanoj de pluraj landaj asocioj.

**Zlatko Tišljar**

# DEBATO DE CAFEBABEL.COM EN BRUSELO: Multlingva edukado, ĉu nur por la elito?



En Les Halles Saint Géry en Bruselo okazis la 7-an de majo la debato sub la supra titolo.
Partoprenis inter aliaj Leonard ORBAN, Komisionano pri lingvoj de EU, Christian DUPONT, ministro pri edukado por franca parto de Belgio kaj Henny-Annie BIJLEVELD, profesoro pri la nederlanda en la Libera Universitato de Bruselo.
temis pri publika debato kaj partoprenis interalie ankaŭ pluraj esperantistoj: Sean O Riain, Flory Witdoeckt, Maja Tišljar, Remy Sproelants... Kelkaj el ili ankaŭ partoprenis en la debato stariginte demandojn rilatajn al Esperanto. Ŝajnas ke la esperantistoj eĉ troigis per la tro longaj diskutoj.

**Maja Tišljar**

# INFANOJ PARTOPRENANTOJ DE DIVERSAJ KONGRESOJ




Kiel vi legis jam komence de la bulteno, ni ĉi somere partoprenis IJK-on, familie. Estis agrable renkonti ankaŭ aliaj homoj kun junaj gefiloj, junaj esperanto-parolantoj. Infanoj inter si ludis kaj, kiel nur infanoj scipovas , amikiĝis kaj intersxanĝis opiniojn.
Sed tamen, kiel kutime en similaj okazoj, aperis iu "plenkreskulo" kiu memcerte klarigis al mi, ke infanoj ne estas bonvenaj en tiaj aranĝoj (li klarigis ankaŭ ke mi estas tro aĝa por partopreni IJK-on), ĉar ili simple ĝenas. Mi pripensis pri tio, kaj konstatis ke infanoj kutime ne partoprenas prelegojn kaj diskutojn, kaj ke kutime komprenas kiam iu "grava" plenkreskulo ne havas tempon kaj emon babili kun "infanoj" (kvazaŭ infanoj ne estas homoj), nur estas bezonate diri tion al infanoj.
Bedaŭrinde tiaj okazoj estas oftaj kaj mi ne aŭdis similan aferon unuan fojon (tamen kutime de homoj kiuj ne havas infanojn). Nun aperas tri demandoj: Ĉu homo kiu havas infanojn ne plu rajtas partopreni aranĝojn aŭ nepre devus lasi infanojn ie alie? Aŭ denaskaj parolantoj 2-12 jaraĝaj estas malbonaj portantoj de movado? Ĉu ne estas ĝuste ili tiuj, kiuj daŭrigos la tradicion de la lingvo?
Karaj esperantistoj, estus bele se ĉiuj ni povus veni al kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj kune kun gefiloj kiuj parolas Esperanton. Tiam ni ne devus timi pri ĝia estonteco.
**V.O.**

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
**Finredaktita: la 30-an de auxgusto 2008.**
**Redaktorino: Vesna Obradović.**
**En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Hose Roldan Leon kajVesna Obradović**
**Kontakto:** vesna.obradovic@gmail.com
**Retpaĝo:** http://www.lingvo.org, www.europo.eu